Johann Wolfgang von Goethe,

# Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
Atendu – baldaŭe
Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-01.*

*MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)*

Johann Wolfgang von Goethe,

# Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —
silent',
tra pinopingloj
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ekmutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* PEJNO SIMONO *(Simon Edward Adrian Payne, ∗1941-12-23).*

*Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe`.

Johann Wolfgang von Goethe,

# Super montoj regas kviet'

*tradukita de Poul Thorsen*

Super montoj
regas kviet',
tra l' foliaro
nur ventet'
spiras kun trem'.
Birdoj arbare silentas,
se vi atendas,
pacas vi mem.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* POUL THORSEN *(∗1915-01-07 – †2006-01-30).*

*Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)*

*Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ:* `http://www.poulthorsen.dk/` *kaj* `http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view`.